

O BRASIL — ESPERANTISTA

ORGÃO OFICIAL DA "LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA" — Sociedade de utilidade pública.
NOVA FASE DO "BRAZILA ESPERANTISTO"

Número 13-14 (295-296)

Janeiro-Fevereiro 1939

Redator responsável:
Dr. Carlos Domingues

Administração e redação:
Praça da República, 54.
Rio-de-Janeiro, Brasil.

Gratuito para os sócios da Liga.
Eksterlande: Unu dolaro aŭ 15
respondekuponoj.

O ESPERANTO NO BRASIL EM 1938

O Esperanto, que faz progressos seguros no mundo inteiro, acompanhou no Brasil, em 1938, esse ritmo de desenvolvimento cultural, sob a orientação da Liga Esperantista Brasileira.

Vários fatos demonstram a pujança do movimento esperantista brasileiro e dentre eles mencionaremos sinteticamente alguns a seguir.

Dando cumprimento à principal resolução do Congresso Jubilar do Esperanto, realizado em Cracóvia, a Liga Esperantista Brasileira, por intermédio do Dr. J. Marques dos Reis, ex-ministro da Viação e Obras Públicas, dirigiu-se ao Ministério da Educação para que o Governo Brasileiro adira ao Convênio Internacional Escolar que tem por fim a adoção obrigatória do Esperanto nas escolas de diversos Estados.

O pedido da Liga, informado favoravelmente pelos órgãos competentes do Ministério foi encaminhado ao Conselho Nacional de Educação, onde foi relatado pelo Prof. Jônatas Serrano, que justificou também oralmente os fundamentos do seu voto pela adesão do Brasil ao Convênio. O Conselho Nacional de Educação, por doze votos contra um, aceitou a conclusão do relator.

Foi igualmente ouvido a respeito da proposição o Instituto Nacional de Estudos Pedagógicos, que emitiu parecer favorável, estando assim o Governo Federal munido dos esclarecimentos e opiniões que o habilitarão a resolver o importante assunto.

Para esse fim poderá o Governo ter em vista os resultados colhidos do emprego do Esperanto no Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística,



D-ro João Marques dos Reis, prez. de la Brazilo Banko kaj eksministro por Trafiko kaj Publikaj Laboroj.

organização que visa à unificação das estatísticas brasileiras.

— Em assembléia geral desse Instituto foi unanimemente aprovada uma moção apresentada pelo seu secretário, Dr. Mario Teixeira de Freitas, a qual recomenda que os departamentos brasileiros de estatística adotem o Esperanto.

O Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística, diretamente subordinado à Presidência da República e presidido pelo Embaixador Macedo Soares, publicou uma brochura intitulada "Statistika Resumeto" (Resumo Estatístico) com o texto só em Esperanto, o que deu lugar ao recebimento de larga correspondência na língua auxiliar e à

criação de um curso especial da língua destinado ao ensino dos funcionários e ministrado durante as horas do expediente.

Um movimento como o do Esperanto está naturalmente ligado à publicação e divulgação de livros. Assim o compreendeu o Sr. Ismael Gomes Braga que prosseguiu na sua entusiástica tarefa de escrever, editar e disseminar livros em Esperanto. No ano de 1938 publicou ele, por intermédio da Livraria da Federação as seguintes obras: "Manual Completo de Esperanto", "Primeiro Manual de Esperanto", "Método de Esperanto", "Esperanto-Modelo" e "Livros e Discos". Sabedor profundo do idioma e um dos seus mais reputados estilistas, o Sr. Ismael Braga tem obtido brilhante e justo êxito, como o atestam as críticas feitas na imprensa brasileira e nos jornais esperantistas estrangeiros. É de assinalar outro-sim, a ótima impressão causada pela apresentação das obras, todas elas trabalho gráfico dos Irmãos Pongetti.

Ampliando o seu campo de ação, a Livraria da Federação editou também dois manuais em língua espanhola, compilados pelo Dr. Jaime Scolnik, médico residente na República Argentina. Dessa forma será muito beneficiada a propagação do Esperanto nas repúblicas hispano-americanas, onde o Esperanto conta bons e dedicados cultores.

Graças a uma vasta rede de distribuição os livros de Esperanto estão hoje em todas as livrarias de todos os recantos do Brasil e a publicidade deles faz-se largamente pelo rádio, pela imprensa e cartazes nos lugares públicos.

Como em vários outros Congressos Universais de Esperanto, o Brasil es-

teve representado no 30º realizado em Londres. O Dr. Caio de Melo Franco, que por decreto federal foi nomeado delegado oficial, saudou o Congresso acentuando que o Governo Brasileiro há de por certo continuar a dar como até aqui o seu apoio ao movimento esperantista.

São conhecidas as íntimas relações entre a filatelia e o idioma neutro. Daí o grande êxito do mostruário do Esperanto na Exposição Filatélica Internacional — Brapex, realizada em Outubro de 1938 no Rio-de-Janeiro.

A Liga Esperantista Brasileira editou em papel de luxo dois belos quadros com os títulos "Brazila Poŝto kaj Esperanto" e "Internacia Filatelia Ekspozicio — BRAPEX", quadros dos quais fez vasta divulgação. Os 4 selos brasileiros com dizeres em Esperanto, emitidos por ordem do dr. Marques dos Reis, continuaram a merecer a maior aceitação por parte dos filatelistas do mundo inteiro, bastando dizer que só a Liga Esperantista Brasileira e o delegado comercial da Internacia Esperanto-Ligo no Rio-de-Janeiro remeteram aos interessados em 52 países mais de 10.500 desses selos.

É digna também de nota a cooperação que o rádio vem prestando ao desenvolvimento do Esperanto. Estações do Rio-de-Janeiro e dos Estados irradiam palestras, declamações, informações sobre o Esperanto e concertos com canto nesse idioma. Citem-se as seguintes estações: Rádio Clube do Brasil (PRA 3), Rádio Sociedade Mayrink Veiga (PRA 9), Rádio Sociedade da Baía (PRA 4), Sociedade Rádio Mineira (PRC 7), Rádio Inconfidência (PRI 3), Rádio Nacional (PRE 8) e Rádio Clube de Pernambuco (PRA 8), havendo este último transmitido um curso da língua.

Como efeito da ação constante da Liga Esperantista Brasileira registouse em várias cidades de diferentes Estados do Brasil (São Paulo, Goiaz, Baía, Pernambuco) a fundação de novos grupos esperantistas, funcionaram cursos em muitas escolas e em grupos esperantistas e houve conferência pronunciada em Esperanto por esperantista estrangeiro e palestras de propaganda da própria língua. Cresceu também de algumas dezenas o número dos delegados da Liga no país.

A Liga Esperantista Brasileira teve, pois, um ano profícuo e o seu programa de ação para 1939 não deixará resultados menos fecundos na sua formosa e perseverante obra de cultura e patriotismo.

Subvencio al B. L. E.

Lia Ekscelenco s-ro d-ro Getulio Vargas, prezidanto de la Brazila Respubliko, sin bazinte sur favora propono de la Socia Konsilantaro, kiu lin rimarkigis pri la propagando de Brazilo, kiun delonge jaradis Brazila Ligo Esperantisto, decidis trioblighi la subvencion, kiun de multaj jaroj tiu ĉi ricevas. Al la eminenta prezidanto de nia kara Brazilo kaj al la membroj de la Socia Konsilantaro, niajn varmajn gratulojn.

Sciigis per telegramo al la prezidanto de B. L. E. tiun plezurigan okazaĵon d-ro Carlos Drummond de Andrade, ĉefo de la kabineto de s-ro Ministro de Edukado.

Lerneja Interŝtata Esperanto-Akordo

La brazila registaro ankoraŭ ne sancieis la rezolucion de la Brazila Konsilantaro de Edukado pri la aliĝo de Brazilo al la I E A K, pri kies praktikebleco tre favore informis s-ro Prof. M. Lourenço Filho, direktoro de la Nacia Instituto de Pedagogiaj Studoj.

Ĝi kuŝas en la manoj de d-ro Gustavo Capanema, ministro de Edukado, kiu pro siaj multaj okupoj ankoraŭ ne povis ĝin prezenti al d-ro Getulio Vargas, prezidanto de la Respubliko. Ni esperas, ke tre baldaŭ tio okazos.

Diversaj esperantistaj gazetoj, el kiuj estas citindaj la jenaj: "Heroldo de Esperanto", "Esperanto-Internacia" kaj "Pola Esperantisto" detale parolis pri tiu grava okazintaĵo.

El tiu ĉi ni citas la jenan frazon: "La nomo de Brazilo estas depost tiu tempo multe propagandata inter ĉiuj partoj de la terĝlobo".

Nia Ligo ankaŭ ricevis multajn gratulajn leterojn kaj poŝtkartojn. El la letero de S-ro Antoni Czubrynski, pola samideano, aŭtoro de la propono pri I E A K, ni elĉerpis la jenon "Kun vera kortuŝo mi legis en la esp. preso la sciigon pri la raporto de d-ro Jonathas Serrano. La preparoj estis modele organizitaj kaj estu ili ĉie tiamaniere aranĝotaj kaj la venko estus certa en kelkaj jaroj. Mi povas al Vi tutkore gratuli kaj Vi estu konvinkitaj, ke via iniciato trovos grandan kaj vastan eĥon en la tuta mondo esperantista kaj incitos al plua laboro la samideanojn en aliaj landoj".

Li skribis artikolon en "Heroldo de Esperanto", kiu finiĝas per la jenaj vortoj: "Laŭ lastmomente ricevitaj sciigoj la brazilaj samideanoj, agantaj modele, multe sukcesis. PLENAJN GRATULOJN AL ILI! La tuta mondo

8-a Monda Kongreso de Edukado

Laŭ propono de Prof. Jonathas Serrano, la Organiza Komitato de la 8-a Monda Kongreso de Edukado, okazonta en Rio-de-Janeiro dum la monato Aŭgusto nunjara, decidis alpreni Esperanton, kiel unu el la oficialaj lingvoj de la kongreso. Tiam decidon, kune kun aliaj, oni sendis al la "Monda Federacio de Edukadaj Asocioj", en Usono, kiu iniciatis la organizadon de tiuj edukadaj kongresoj, por fina aprobo.

La prezidanto de la Organiza Komitato estas Prof. Fernando de Azevedo, kiu, kiel direktoro de la Publika Instruado en Rio-de-Janeiro, akceptis la proponon de Prof. Jonathas Serrano por la uzado de Esperanto en la Lerneja Interkorespondado, kaj viceprezidanto Prof. M. Lourenço Filho, unu el la aprobintoj de la rezolucio de la Brazila Konsilantaro de Edukado. Ĝia sekretario estas s-ro Cerqueira Lima, kiu lernis Esperanton, kiam li estis studento, kaj ankaŭ apartenis al tiu komitato la klera kaj fervora esperantisto d-ro Mario Teixeira de Freitas, ĝenerala Sekretario de la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko.

Ni esperas, ke la Monda Federacio de la Edukadaj Asocioj aprobos la decidon de la Brazila Organiza Komitato.

OS FATOS

Em 11 de Outubro último o Ministro da Educação Nacional da França enviou aos diretores das Universidades francesas uma circular na qual, salientando as vantagens do uso do Esperanto para as relações não só entre os intelectuais como também entre os comerciais e técnicos das diversas nações, recomendava a abertura de cursos facultativos dessa língua auxiliar nas aulas a elas subordinadas.

Em consequência dessa circular, nos meses de Novembro e Dezembro, inauguraram-se cursos em 7 escolas normais, 14 escolas primárias superiores, 2 escolas profissionais, 2 escolas comerciais, 8 liceus e colégios das Universidades de Aix, Besançon, Caen, Lille, Lyon, Montpellier, Paris, Poitiers e Strasburg. É superior a 1000 o número de alunos matriculados nesses cursos.

esperantista admiras ilin kaj provos fari la samon, ĉiu en sia lando, laŭ la ebleco."

Tre interesaj estas ankaŭ la leteroj de "Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj" kaj "Esperanto-Asocio en Ĉeĥio-Slovaka Respubliko.

LA VENONTA HOMO

Pilguciras Lima

Rabindranath

Ĉu vi konas mian landon?

Ĝi estas la plej arda parto de Brazilo.

Ĝi ŝajnas fornego, kraketanta

en la koro de Ameriko!

La herooj en Paragvajo

la plej puraj apostoloj por la sklava-

[bolicio

devenis de tie ĉi, Rabindranath

de mia lando.

de Ceará!

Tagore!

Mi scias tion, kion vi profetis

pri la destino de Suda Ameriko:

vi antaŭdiris, Rabindranath,

Ke aperigos la Nova Kontinento,

antaŭ eble dek jaroj,

homon eksterordinaran,

mi-regigotan la mondon!

Nu!

Mi, ano de tiu ĉi lando-fornego,

kie oni naskiĝas, batalante,

kie oni vivadas, batalante,

kie oni mortas, batalante,

mi ankaŭ ekprofetas,

Rabindranath,

ke tiu homo eksterordinara

de vi revita

kunportos en sia koro

la varmon de mia suno!

Kaj en sia sango

kantados la sovaĝa kuraĝo de mia po-

[polo!

Tiu homo-simbolo

(mi estas certa)

devenos de tie ĉi, Rabindranath,

de mia lando.

de Ceará!

Elportugaligis: *Democrito Rocha*

Fortaleza-Ceará-Brasil.

ESPERANTO KAJ GIMNASTIKO

Laŭ peto de radigimnastikuloj, gelnantoj do prof. Osvaldo Diniz Magalhães, la estraro de Brazila Klubo Esperanto decidis malfermi kurson de la helplingvo, ĉe la sidejo de la Societo de Geografio.

Ĝia inaŭguro okazis la 24-an de Januaro sub la prezido de Generalo Moreira Guimarães, prezidanto de la Geografia Societo, kiu, dirinte kelkajn vortojn pri la valoro de Esperanto, donis la parolon al la gvidanto de l'kurso, s-ro ing. A. Couto Fernandes.

Tiu ĉi faris paroladeton pri la utileco de internacia lingvo, la simpleco kaj facileco de Esperanto kaj ties lastaj progresoj en Brazilo kaj eksterlande. Li deklaris, ke pro ĝia logiko Esperanto povas esti konsiderata gimnastiko de la menso.

SOCIETO DE GEOGRAFIO DE RIO-DE-JANEIRO



Grupo fotograflita antaŭ la solena kunsido de la Geografia Societo.

Je la 25-a de Februaro festis sian 58-an fondiĝan datrevenon la grava "Geografia Societo de Rio-de-Janeiro", al kiu la Esperanto-movado en Brazilo multe ŝuldas. Prezidis la ĝeneralan kunsidon s-ro Generalo Moreira Guimarães, honora prezidanto de "Brazila Klubo Esperanto".

Malfermite ĝin la prezidanto rememorigis la nomojn de la fondintoj de la societo, precipe de Grafo Afonso Celso, ĝia lasta postvivanto, kiu mortis

lastjare.

Poste parolis la Supera Juĝisto d-ro Carlos Xavier, oratoro de la Societo, kiu estis unu el la organizintoj de la S-a Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en Vitória.

S-ro Couto Fernandes salutis la Societon en la nomo de Brazila Ligo Esperantista. Generalo Moreira Guimarães fermite la kunsidon diris kelkajn ĝentilajn vortojn pri la Brazila Ligo Esperantista.

S-ro Ismael Braga, parolante en Esperanto, kies vortojn li tradukadis portugalen, faris alvokon al la gelnantoj, por ke ili ne senkuraĝiĝu dum la vojaĝo kaj iru ĝis la fino de l'kurso.

Poste parolis prof. O. Diniz Magalhães, kiu ankaŭ enskribiĝis en la kurso. Li dankis la esperantistan klubon, kiu ĝentile malfermis kurson por la gelnantoj de la gimnastika kurso de Radio Nacional.

Ankaŭ parolis salutante la novajn gelnantojn s-ro J. Telles da Silva, kiu lernas Esperanton en alia kurso de s-ro Couto Fernandes.

Ferms la kunsidon generalo Moreira Guimarães, kiu petis, ke oni salutu per aplaŭdoj la profesorojn A. Couto Fernandes kaj Ismael Braga.

La kurso funkcias ĉiumarde, de la 17-a ĝis la 18-a. La peranto inter la klubo kaj la gimnastikuloj estis s-ro Antonio Vaz, malnova esperantisto kaj delegito de I E L por gimnastiko.

BRAZILA KLUBO ESPERANTO

La 29 an de Januaro okazis ĝenerala kunsido de la veterana "Brazila Klubo Esperanto" por elektado de nova estraro. Ĝin prezidis s-ro Arminio de Moraes.

Laŭ propono de s-ro A. Couto Fer-

nandes, honora prezidanto, oni akklamis la novan direktantaron konsistantan el la jenaj geanoj: Prez. — s-ro ing. Hernani Motta Mendes, vicprez. — s-ro Arminio de Moraes, unua sek. — f-ino Iracema Alvares Coelho, dua sek. — f-ino Rosa Amaral Malheiro, unua kas. — s-ro Adinar Antunes Pinheiro, dua kas — s-ro Carlos B. da Costa Leite, kaj konsilantoj — f-inoj Iraní Baggi de Araujo kaj Maria Amaral Malheiro, s-roj d-ro Fernando A. de Almeida Brandão, d-ro Viterbo de Carvalho, A. Cactano Coutinho, Ismael Gomes Braga, Generalo José A. Silveira Sobrinho, d-ro Carlos Domingues, Antonio José Vaz kaj Edmundo Vila Verde.

Oni akklamis honora prezidanto de la Klubo s-ro generalon J. M. Moreira Guimarães, prezidanton de la Geografia Societo, eksprezidanton de B. K. E.

Oni aprobis dankan deziresprimon al la Nacia Konsilantaro de Edukado kaj laŭdan deziresprimon al s-ro Ismael Gomes Braga pro lia sindona, vigla kaj senĉesa laboro por Esperanto per eldonado, disdonado kaj disvendado de esperantaj lernolibroj.

La nova estraro decidis, ke la unuan sabaton de ĉiu monato, je la 16-a horo, okazos kunsido de la direktantaro, al kiu povas ĉeesti iu ajn klubano aŭ samideano.

ESPERANTO EN LA TEKNIKA GAZETARO

Dum la solena ferma kunsido de la Naciaj Konsilantaroj de Geografio kaj Statistiko, el kiuj konsistas la Brazilia Instituto de Geografio kaj Statistiko, lastjare okazinta en Rio-de-Janeiro, la prezidanto de Brazilia Ligo Esperantista faris paroladeton, kiu finiĝis per dankaj vortoj al s-ro d-ro Mario Teixeira de Freitas, ĝenerala sekretario de la Instituto, kiu prezentis unuanime aprobitan proponon, por ke la Instituto alprenu Esperanton, kiel duan lingvon.

Post la paroladeto s-ro d-ro Leite de Castro, sekretario de la Nacia Konsilantaro de Geografio, deklaris al la prezidanto de la Ligo, ke la baldaŭ aperonta "Brazilia Revuo de Geografio" enhavos esperantan resumon de siaj artikoloj. Nun fariĝis fakto tiu ĉi deklaro.

Jus aperis la unua numero de tiu revuo, belaspekte, enhavanta 144 paĝojn sur tre bona papero kaj la resumojn en Esperanto de siaj ĉefaj artikoloj. Unu el tiuj artikoloj, kies titolo estas: "Homa Geografio de Brazilo", estis verkita de la fama franca geografiisto Prof. Pierre Defontaine.

Al la Nacia Konsilantaro de Geografio niajn plej korajn dankojn kaj gratulojn.

Ni rememorigas, ke de post 1932 la Revuo de la Geografia Societo publikigas nur en Esperanto resumon de ĉiuj siaj artikoloj.

Jen la esperanta resume de la artikolo de Prof. Defontaine:

"Tiu ĉi estas la unua ĉapitro de la monografio pri la Homa Brazilia Geografio elaborita de la konata geografiisto F. Defontaine, kiu, kiel Profesoro de la Universitato de São Paulo kaj lastatempe de la Universitato de Rio-de-Janeiro, en kelkaj jaroj visitadis Brazilon.

La titolo de la nuna ĉapitro "La elementoj de la Naturo kaj la batalo de la homoj" elmontras la gravecon de la temo, kiun ĝi traktas: kaj, efektive, la aŭtoro montrante la ĉefajn karakterizaĵojn de l' kadro de la brazila naturo kaj la sinsekvajn agmanierojn de la homo, ĝia loĝanto, komencas per tre taŭga maniero sian verkon pri la homa geografio, pri kiu li estas tutmonde konata kiel granda aŭtoritato.

La aŭtoro komencas elstarigante la vastecon de la brazila teritorio, kiu, formante solan, kontinuan tutaron kaj ne havante nelegeblajn regionojn, prezentas vastegan potencialon de spaco, en kiu estas necese starigi ĝustan skalon de grandeco por taksu ĝiajn ele-

mentojn, ĝenerale dotitajn de grandega dimensioj.

Poste la aŭtoro faras skizon pri la historio de la brazila lando, pri kiu li akceptas la diskutatan teorion de Wegener, konsiderante la brazilan teritorion kiel parton disiĝintan de la nuna afrika kontinento kaj translokiĝintan okcidenten; li elstarigas la gravecon de la antikvaj kristalaj terspacoj, gnejso, granito, skisto kaj aliaj, kiuj okupas pli ol unu trionon de la brazila supraĵo; li rimarkigas la fakton, ke la lando restis emerginta tra la geologiaj tempoj, el kio estiĝis la escepta graveco de la eroziaj kaj diserigaj fenomenoj; li distingas la orientan parton de la lando, ĉe la maraj randelsteraĵoj, konsistantaj el masivoj de rokoj pli antikvaj, kristalaj, forte refalditaj, de la okcidenta parto, pli tabloforma, formita de ebenaĵoj, kie superas la sedimentaj formacioj.

La reliefo de la lando estas poste studata kaj la aŭtoro opinias, ke la brazila reliefo estas esence ŝuldata al la terfendetoj kaj al la erozio: la Montaro de la Maro, kiu etendiĝas je pli ol 3.000 km. laŭlonge de la marbordo, estas konsiderata de la aŭtoro kiel produkto de fendeto, havanta rilaton al la apartigo de Suda Ameriko de Afriko, kaj, laŭ ĝia formo, la aŭtoro grupigas la Montaron en la klaso de "duona monto", kiel Monto de la Tablo, en Suda Afriko, aŭ la Cévennes", en Francujo, monto kun unu sola eskarpo, tra kiu oni grimpas la internan ebenaĵon de la lando; pri la erozio, kiun la aŭtoro juĝas tre grava, ĉar la brazila teritorio restis ĝenerale emerginta, ĝi kaŭzis specialajn reliefformojn, kiel la sukerkonusoj" sur la kristalaj rokoj, sur la porfizikaj gnejsoj, reliefigitajn altaĵojn, akrajn kaj graciajn, okazintajn ĉe varmaj kaj malsekaj klimatoj, kiel la "duonaj oranĝoj", rondajn formojn similajn al sferaj kalotoj, kiu iafaje kunigas grandnombre formante verajn "clapotis".

Poste la aŭtoro ekstudas la agmanieron de la homo en rilato al la monto kaj ekzamenas la diversajn funkciojn, kiujn la montoj plenumas en Brazilo: a) la argila monto kun skarpo, kiu malfaciligas la eniron en la internon de Brazilo, kiel okazas kun la Montaro de la Maro kaj Mantiqueira, kaj la aŭtoro rimarkigas la strangecon, ke la enira malfacilaĵo estas ĝenerale ŝuldata pli al la arbaro ol al la reliefo, kaj tion pruvas la fakto, ke la unuaj eniroj estis faritaj ne tra la pli malaltaj trapasejoj, sed tra tiuj de malpli densaj arba-

OS FILMS FALADOS E O ESPERANTO

Já está sendo passado nos Estados Unidos o film confeccionado pela Metro-Goldwin-Mayer, denominado "Idiot's Delight", a respeito do qual falamos em nosso número anterior.

Da revista "Carioca" extraimos os seguintes trechos:

"E não se usará nenhuma linguagem especificada, quando alguém se queixar da situação do país. Todas as amargas referências feitas à guerra serão ditas em esperanto...

Assim será a lingua mundial, acusando a sua maior inimiga — a guerra...

Alem de Clark Gable e Norma Scherer, há ainda uma lista de grandes nomes que torna o elenco verdadeiramente sensacional: Edward Arnold, Pat Paterson (senhora Boyer...), Joseph Schildkraut, Burgess Meredith, Laura Hope Crews, etc.

Todos estão profundamente interessados em aprender qualquer coisa em esperanto. Clark Gable já sabe dizer: "Eu te amo". E repete a todo instante: "Mi amas vin"... naturalmente para dizer baixinho a Carole Lombard...

A importante associação "League of Nations Union", com sede em Londres, à rua Grosvenor Crescent, e filiais nas principais cidades do Império Britânico, aprovou, na Assembléa Geral realizada em Dezembro último, a seguinte resolução:

"A Assembléa do Conselho Geral pede que a Comissão de Realizações empregue todos os esforços no sentido de ser em todas as escolas ensinado um idioma internacional, como um passo necessário para o avanço da intercomunicação e da intercompreensão internacional.

CURSOS POR CORRESPONDÊNCIA

elementar. 20\$000
superior. 30\$000

roj; b) la minhavaj montoj, kies ekspluato estis la unua motivo de la eŭropa koloniigo de la montoj, precipe ĉe Ŝtato M.Gerais; c) la paŝtriciaj montoj, — tiu ĉi funkcio de la montoj, kiu, ĝenerale, estas tre grava, en Brazilo havas relative malgrandan gravecon; d) la somerlodgeja monto, dank' al la proksimeco de la montaraj al la grandaj marbordaj urboj; e) la industria monto, precipe kun hidroelektrikaj instaltoj; estas notinda la potencialo de la energio, kiun la altaj montoj enmagazenigas en zono, kie la pluvemeco estas tre forta.

(Finota)

Internacia Konkurso 1939

Kiel por la pasintaj jaroj, tiel ankaŭ por la nuna juro nia Internacia Esperanto-Ligo starigis konkurson, jam konatan sub nomo "Internacia Konkurso". En 1937 tiun konkurson gajnis la Norvega Esperantista Ligo, en 1938 gajnis la Svisa Esperanto-Societo. Kaj kiu estos la gajninto de la I. K. 1939?

Ĉiu asocio havas la ŝancon.

Jen la reguloj por la nova Konkurso:

Por ĉiu membro aligitaj al IEL, estas donotaj poentoj laŭ jena tabelo:

Asocia Membro — 1, Membro kun Jarlibro — 5, Membro-Abonanto — 10, Membro - Abonanto - Heroldo — 12, Membro - Subtenanto — 15, Dumviva Membro (nova) — 30, Patrono — 50, Entrepreno — 10, Vendo de kuponlibreto — 5.

Je la fino de Decembro 1938 la nombro da poentoj de BRAZILo estis 429 kaj je la 28-a de Februaro nunjara estas 468. Do ni ankaŭ havas la ŝancon gajni la premion, kiu konsistas el \$ 10 (ĉirkaŭ 850\$000) kaj artan diplomon. Se Brazilia Ligo Esperantista gajnos la premion, ĉiu brazila delegito ricevos libro-premion. Al la afero, karaj delegitoj!

Brazilia Ligo Esperantista


Balanceto referente ao anno de 1938

| | |
|---|-----------------------|
| Saldo de 1937 | 14\$500 |
| Subvenção recebida do Ministério da Educação | 499\$500 |
| Quotas de sócios | 3.581\$400 |
| Venda de livros e percentagens | 331\$600 |
| Garantia kaso (caixa de garantia) | 370\$000 |
| Curso por correspondência | 40\$000 |
| Saldo do 9.º Congresso de Esperanto | 10\$000 |
| Anulações de lançamentos | 190\$000 |
| Impressão de "O Brasil Esperantista" e outras impressões | 1.532\$600 |
| Importância paga à Internacia Esperanto-Ligo, proveniente de quotas de sócios | 2.364\$800 |
| Sêlos de correio, telegramas, estampilhas e despesas muidas | 467\$100 |
| Material de expediente | 122\$300 |
| Vencimentos do zelador | 360\$000 |
| Indenizações | 168\$000 |
| Saldo para o ano de 1939 | 22\$200 |
| Soma | 5.037\$000 5.037\$000 |
| Rio-de-Janeiro, 15 de Fevereiro de 1939 | |
| Tesoureiro (ass. Odillo Pinto). | |

EXERCICIOS DE ESPERANTO

| | |
|-------------|---------|
| duzia | 10\$000 |
| um | 1\$000 |

PERNANBUKA ESPERANTO—ASSOCIO



Maldekstre dekstren: S-roj Francisco Ristal Ferreira, kas., d-ro Sebastião de Albuquerque, gen. sek., Tomaz Vila Nova, vicprez., d-ro Carlos Domingues, vizprez. de B. L. E., d-ro Aguiinaldo Lins prez., f-ino Artemisa de Araujo, dua sek. kaj s-ro Odilon de Araujo, unua sek.

2400 grafias diferentes para um só nome

Mostrou o Dr. Jacques Bertillon que o simples nome próprio francês "D'Aunay" pode ter 2400 grafias diferentes.

A letra inicial "D" pode ser maiúscula, com ou sem apóstrofo e minúscula com o apóstrofo: D'Aunay, Daunay ou d'Aunay. Ora nós vemos grafias muito diversas. Depois da letra "D" pode existir ou não um "h", o que, em combinação com as três grafias já expostas perfazem seis, — nominalmente as três primeiras e mais as seguintes: D'Haunay, Dhaunay, d'Haunay.

O som "au" pode ser escrito em francês conforme cinco diferentes maneiras: o, os, ô, au, eau; cada uma destas cinco maneiras pode combinar-se com as seis grafias antes nomeadas e o resultado é 30 grafias somente para a primeira sílaba, nominalmente, para aquelas já citadas, e mais: Donay, Dosnay, Dônay, etc.

Pode-se escrever esse nome com um ou dois "n" o que, em combinação com as trinta grafias anteriores, fazem sessenta.

O som "ay" pode ser escrito em cinco diferentes maneiras: é, ai, ay, ei, ey. Combinando essas diferentes maneiras com as sessenta anteriores teremos 300 possíveis grafias.

Finalmente, o vocábulo pode finalizar por oito diferentes formas: s, t, z, e, st, t, (precedido de acento circunflexo — Dônêt) ts, ou totalmente sem consoantes finais. Isso, em combinação com as 300 grafias já anotadas fazem verdadeiramente a soma de 2400 grafias.

CHAVES DE ESPERANTO

| | |
|-------------|---------|
| uma | 1\$000 |
| duzia | 10\$000 |

Em conclusão o Dr. Jacques Bertillon mostra que o número não para aqui. Existem mais: D'Aulnay, D'Ohnet, Domné, d'Aulnaies...

E é somente assunto sobre um vocábulo dissílabo.

Tal cáos na ortografia retrata a maior parte das línguas cultas. Por isso, viu ele se difundiu através o mundo. Em Esperanto, ao contrário, cada letra tem sempre o mesmo som e cada som é representado matematicamente da mesma maneira. Eis a causa pela qual a pronúncia do Esperanto permanece invariável em todos os povos; compreensivelmente acontece haver algumas simples variações, as quais, também, de nenhum modo a prejudicam, mesmo em algum país onde os habitantes de diversas regiões falam a mesma língua um pouco diferente.

Sebastião Almeida Oliveira.

(Tradução do Esperanto de "La Multe Kolora Libro", em 17-XII-1938).

KUPONLIBRETOJ DE I. E. L.

Jam pagis al Internacia Esperanto-Ligo, pere de Brazilia Ligo Esperantista, la sumon de la kuponlibretoj eldonitaj por malaperigi la deficiton de tiu Ligo la jenaj gcesperantistoj:

| | |
|----------------------------------|---------|
| A. Couto Fernandes | 24\$000 |
| Ismael Gomes Braga | 24\$000 |
| Dr. Carlos Domingues | 24\$000 |
| Adinar Antunes Pinheiro | 24\$000 |
| F-ino Estevina Magalhães | 24\$000 |
| F-ino Hermínia Magalhães | 24\$000 |
| F-ino Edith Wehrs | 24\$000 |
| F-ino Balbina Morais | 24\$000 |
| Ing Jaime Martins de Souza | 12\$000 |

204\$000

BRAZILA KRONIKO

AMAZONAS. *Manaus.* — S-ro Sebastião Augusto publikigis en "O Jornal" diversajn artikolojn, per kiuj li faris propagandon de Esperanto kaj Skoltismo. Li ankaŭ sukcesis, ke tiu ĉi ĵurnalo, la plej grava en la ŝtato, publikigis en sia 76paĝa eldono, aperinta la unuan de Januaro, diversajn frazojn en portugala lingvo kaj en Esperanto pri la ĉefaj produktoj de la ŝtato. Niajn korajn dankojn al s-roj H. Archer Pinto kaj Aginaldo Archer Pinto, direktoroj de tiu ĵurnalo.

GEARÁ. *Fortaleza.* — Dank' al klopodoj de d-ro Demócrito Rocha aliĝis al niaj Ligoj kiel MA s-ro J. M. Othon Sidon. f-ino Maria Stael Porto kaj d-ro Ermínio Araujo. La unua fariĝis VD kaj la aliaj FD. Nia afero bone progresas en tiu norda ŝtato kaj ni esperas, ke baldaŭ fondiĝos esperantista grupo. Dum festo, kiun la "Domo Juvenal Galeno" dediĉis al la glora verkisto kaj poeto Antonio Sales pro la apero de lia nova libro "Portretoj kaj Rememoroj", f-ino Cleudes Peixoto deklamis la poezion, kiu aperas en tiu ĉi numero.

D-ro Demócrito Rocha inaŭguris novan kurson.

Nova-Russas. Aliĝis al niaj Ligoj s-ro Claudio Sabino Gomes.

PERNAMBUCO. *Recife.* — Pere de s-ro Odilon de Araujo, sek. de Pernambuka Esperanto-Asocio, ni ricevis la aliĝon de s-ro Arthur Veloso, kiu fariĝis PD por bankaj aferoj. Nun estas en Recife ses delegitoj! Remalfermiĝis la kurso ĉe la sidejo de tiu asocio.

Longa kaj interesa artikolo titolita "Vera frateca verko", de s-ro Odilon de Araujo, aperis en la revuo "Donaco de Kristnasko". Dank' al s-ro F. Ristal Ferreira diversaj notoj pri Esperanto aperis en "Diario da Tarde" kaj "Diario da Manhã".

Garanhuns. La gazeto "Reflexo" dediĉis al Esperanto unu tutan paĝon de sia numero de la 2-a de Januaro. Ĝi aperigis fotografajn faritan dum trapasado en Recife de nia karega amiko Pastro A. Stellacci.

Per tiu gazeto mi eksciis, ke la unua tiea poresperanta artikolo aperis en "Luz do 15", oficiala organo de "Kolegio 15 de Novembro".

BAIA. *Salvador.* — Je la 15-a de Decembro la loka grupo festis ĉe sia sidejo, per solena kunsido, la maskigan datrevenon de nia karega majstro Zamenhof. Ĝin prezidis s-ro Ademar Sena. Parolis pri Zamenhof kaj ties verkoj s-roj ing. Jaddo Couto Maciel kaj Carlos Sepulveda. Finiĝis la festo per

la fermo de la kursoj de Esperantista Instituto, kiu disdonis premiojn al du gelnantoj, kaj per la esperantista himno. "Diario de Noticias" aperigis fotografajn de la ĉestantoj.

Multvizitata estis la stando de Esperanto, starigita ĉe la Specimena Foiro, kie la grupo faris ekspozicion de esperantistoj.

Aperis la 3-a numero de "Esperantista Bahiano", dank' al la sindonemo de s-ro ing. Jaddo Couto Maciel, kiu ĝin disdonis al esperantistaj asocioj kaj gazetoj, al ŝtataj lernejoj kaj al gravaj personoj. Ĝi enhavas interesajn artikolojn en portugala lingvo kaj en Esperanto.

Pere de s-ro Ismael Braga la grupo aĉetis grandan kvanton da libroj en kaj pri Esperanto por sia biblioteko.

Alagoinhas. — S-ro Carlos Cunha malfermos ĉe la Normala Lernejo, kies direktoro estas s-ro prof. Alcindo Camargo, la kurson de Esperanto, pri kiu ni parolis en nia lasta numero.

S-ro Carlos Cunha fariĝis MAH kaj delegito de I. E. L. Li intencas fondi baldaŭ esperantistan grupon. La lokaj gazetoj "Jornal de Alagoinhas", "O Popular" kaj "Correio de Alagoinhas", kiuj estas tre favoraj al nia movado, publikigis artikolojn kaj notojn pri la progresoj de Esperanto.

Santo Amaro. — Notoj pri Esperanto aperis en "O Município".

S. PAULO. *S. Paulo.* — Dum Januara kunsido "S. Paulo Esperanto Klubo" decidis malfermi novan kurson. La japana esperantisto s-ro Tsutomu Suzuki, kiu vizitis la sidejon de B. L. E., aliĝis al "Brazila Klubo Esperanto" kaj al la loka klubo.

"Revista Filatélica Bandeirante" en sia numero de la lasta jarkvarono de 1938 publikigis longan artikolon titolitan "Graveco de la Filatelio", per kiu li montras la gravecon de la filatelijaj ekspozicioj.

Bazinte ĝin sur la lasta numero de "O Brasil Esperantista" li konkludas, ke la eldono de la poŝtmarkoj memorigaj de la kongresoj de Esperanto kaj de la Specimnaj Foiroj de Rio-de-Janeiro multe kontribuis por disvastiĝi eksterlanden la nomon de nia kara Brazilo. La revuo ilustras sian artikolon per klišoj de tiuj poŝtmarkoj kaj stampoj de "Brapex".

Niajn korajn dankojn al la "Sociedade Filatélica Bandeirante".

Tanabi. — S-ro Sebastião A. Oliveira aperigis en sia gazeto "O Município" artikolon titolitan "Esperantista Literaturo".

Araraquara. — "O Imparcial" publikigis longan artikolon de s-ro Lauro C. Elmke, prezidanto de "União Operária". Skribante letero al s-ro Ismael Braga li deklaras, ke lerninte Esperanton li plenumis unu el la plej malnovaj aspiroj de sia vivo.

Li intencas malfermi kurson de tiu lingvo kaj ĝin propagandi en sia regiono. Ni esperas, ke baldaŭ fondiĝos grupo en tiu progresema urbo.

Igarapava. — La prez. de B. L. E. ricevis leteron subskribitan de s-ro Prof. João Rodrigues Smarth dos Santos, kiu per entuziasmaj vortoj certigas la apogon de la studema junularo de la urbo al la esperantista movado. Li elmontras da deziron de siaj kunuloj fondi grupon, organizi bibliotekon kaj malfermi kurson. Responde la prez. de B. L. E. sendis diversajn propagandilojn kaj informon pri la fondo de grupo.

Monte Aprazível. — Aliĝis al nia Ligo s-ro d-ro Ricardo de Carvalho, kiu kune kun s-roj Constantino de Carvalho kaj d-ro Benjamin Brotas formas la estraron de "Grupo Esperantista de Monte Aprazível".

Santos. — Revenis el la ĉefurbo nia kunligano s-ro Lauro Jorge de Oliveira. Ni esperas, ke li fariĝos tiea delegito de I. E. L. kaj sukcesos vekti la dormantan tiean grupon.

RIO GRANDE DO SUL. *Pelotas.* — "Diario Popular" publikigis artikolon de esperantisto, kiu sin kaŝis sub la pseŭdonimo *kronisto*. Alia esperantisto li respondis kaj rememoris la nomojn de la fervoraj geesperantistoj s-ro José Pedro Franz kaj f-ino Antoninha Barum, antaŭlonge mortintaj, kies mortoj faliĝis la tiean gloran grupon "Esperanta Klubo Verda Stelo". La partoprenintoj en la 5-a Brazila Kongreso de Esperanto gardas en sia memoro la nomon de f-ino Antoninha Barum, kiu reprezentis en Vitoria la esperantistaron el Rio Grande do Sul.

La *kronisto* poste publikigis diversajn artikolojn kaj diris ke, kiel radiaparolisto, li multfoje parolis pri Esperanto kaj, bedaŭrinde, liaj paroloj ne trovis elon.

Aperis ankaŭ artikolo de *maljuna lernanto* titolita "Esperanto kaj Radio".

Al la *kronisto* skribis leteron la prezidanto de B. L. E. Ni esperas, ke el tiuj artikoloj rezultos la fondo de nova esperantista grupo.

MINAS GERAIS. *Belo Horizonte.* — S-ro Wilson Veado, nia delegito, sciigis nin, ke sekve de letero, kiun li skri-

bis al la Centra Direktantaro de la Studentoj de l'Universitato de Minas Gerais, oni kreis, kiel ties aneksaĵon, Esperantan Departementon, kies direktoro li estas. Kiam malfermiĝas la kurso de la Universitato, estos inaŭgurata kurso de Esperanto, kiun espereble direktos kapitano Jorge Sant'Anna. La Departemento intencas krei bibliotekon kaj aliĝi al nia Ligo, kiu ankaŭ ricevis ĝentilan leteron subskribitan de s-ro Fausto de Paula Pinto, prezidanto de la Direktantaro. Al tiu ĉi skribis dankan leteron la prezidanto de B. L. E.

S-ro Wilson Veado, kiu fariĝis ankaŭ fakdelegito por Hemio, disradiis pere de la stacio de "Rádio Inconfidência" dum la "Universitata Horo" interesan paroladon, kiun ni aperigas aliloke.

"Diario da Tarde" aperigis notojn pri Esperanto.

GOIAZ, Goiaz. — S-ro José E. da Veiga, kiu eklernis Esperanton antaŭ nelonge, skribis al S-ro Ismael Braga sur interesa propaganda poŝtkarto, kiun li eldonis.

Al li B. L. E. sendis esperantaĵojn.

RIO DE JANEIRO. — Aliloke ni detale parolas pri la ĝenerala kunvido de la veterana Brazila Klubo Esperanto kaj la kurso malfermita sub ties direktado.

— S-ro Francisco A. de Almeida Junior, profesoro de la Porblindula Instituto Benjamin Constant, prezentis al ties direktoro proponon pri la enkonduko de Esperanto en la programon de la unuagrada instruado. Per trafaj argumentoj li montras, ke la helplingvo estas multe pli necesa por la blinduloj ol por la vidantoj. Ni esperas, ke tiu propono ricevos la akcepton de la nuna direktoro, konata kiel progresemulo.

— En la gazeto "Muirakitan", oficiala organo de la literatura klubo Mello e Souza, kiu funkcias ĉe Internulejo de Kolegio Petro II, ni legis, ke laŭ peto de kelkaj lernantoj, prof. J. B. de Melo e Souza, honora membro de B. L. E., intencas malfermi kurson de Esperanto dum la monato Marto. La lernantoj deziras post trimonata lernado inter-korespondi kun fremdaj esperantistoj.

—La prez. de B. L. E. ricevis poŝtkarton de s-ro Luigi Pazzaglia, skribitan je la 1-a de Januaro sur la ŝipo "Conde de Savoia", per kiu li deziras feliĉan novjaron al ĉiuj brazilaj esperantistoj. Dankon!

Vizitis la sidejon de B. L. E. nia kara itala samideano Pastro A. Stellacci, s-ro Osvaldo Leite de Moraes, kaj d-ro Castro Menezes.

— En la revuo "Beira-Mar" s-ro

Comédia Linguística

Crônica lida na Rádio Inconfidência — PRI — 3, durante a "Hora Universitária", irradiada das 18,45 às 19,15, aos domingos, no dia 28 de outubro de 1938.

Quando no mês passado, quatro cabeças decidiram em Munique a sorte do mundo civilizado, salvando-o de uma catástrofe iminente e de consequências terríveis, bem poucas foram as pessoas que, deixando de parte o aspeto político do conclave, apreciaram um ponto de vista de alta significação da referida reunião: o ponto de vista linguístico.

De fato, a par com as dificuldades dos seus problemas diplomáticos, os quatro estadistas esbarrraram com a dificuldade oriunda da diversidade dos idiomas empregados: o inglês, o francês, o alemão e o italiano. Para sanar esse obstáculo, por si mesmo, uma barreira, tiveram eles de recorrer a um processo um tanto antiquado, o do intérprete, que já devia ter caído no olvido, uma vez que, ao seu alcance se encontrava um outro método muito mais lógico e patriótico; mas, tal não aconteceu. Os quatro dirigentes não souberam aproveitar esse outro método que, sem dúvida, é um verdadeiro tesouro! Preferiram vêr-se subordinados ao arcaísmo ridículo e cômico do intérprete.

Na primeira conferência entre mr. Chamberlain e herr Hitler, em Berchtesgaden, os jornais de Londres, Paris e Berlim lamentaram que se tivesse perdido tanto tempo na tradução das palavras dos dois grandes homens! E, se entre duas pessoas o tempo empregado nesse mister foi grande, que dizer então da conferência de Munique, entre quatro personalidades, cujos idiomas diferem tão profundamente um do outro? Seria interessante assistir-se a uma tal reunião para se vêr o trabalho insano dos intérpretes para traduzir as palavras de Herr Hitler, do signor Mussolini, de mr. Chamberlain e de m'sieur Daladier. Imaginemos agora, por absurdo, si os quatro homens que deram ao mundo uma paz momentânea, fictícia e insegura, se puzessem todos a conversar a um só tempo. Seria como si nós

tivéssemos sido transportados pela mão do Tempo, ao começo dos séculos e depositados em frente à Torre de Babel, no momento em que Deus, castigando a vaidade dos homens, lhes confundia os idiomas. Ou então poderíamos supor que nos achávamos numa das ruas de Stambul, a antiga Constantinopla, a cidade mais cosmopolita do globo, onde fervilham elementos de raças e idiomas os mais diversos.

Não fosse o seu caráter grave, poderíamos chamar, então, a Conferência de Munique, no ponto de vista linguístico, uma "comédia de erros", num plágio grotesco, mas verdadeiro, daquele conto de Shakespeare.

E assim são todas as conferências, reuniões, conclaves ou congressos entre duas ou mais nações. São sempre um fracasso e uma pantomima.

Os conferencistas poderiam vêr-se livres desse impedimento, si não fossem tão céticos, de vez que, o instrumento por que o sanarum se acha ao seu alcance, há meio século. Empregar intérpretes é uma tolice desmedida, quando todos nós temos um idioma neutro internacional, capaz por seu caráter de simplicidade, clareza, harmonia, racionalidade e facilidade, de solucionar a contento todas essas questões, sem humilhar ou desprestigiar essa ou aquela língua, esse ou aquele povo. Quando Zamenhof traçou o esboço do Esperanto, há cinquenta e um anos, tinha em mente criar um idioma capaz de contribuir para a harmonia e concórdia universais, facilitando a inter-compreensão dos homens de todo o orbe. E ele o criou. O Esperanto hoje é uma realidade e só os teimosos e incrédulos, não o aceitam como língua internacional neutra.

Teem olhos e não vêm as vantagens reais que dele adveem!

Teem ouvidos e não ouvem a voz da razão conclamando-os a um ideal de paz, de fraternidade e concórdia que só existirá quando for transposta a barreira linguística que somente poderá ser derrubada pelo Esperanto!

WILSON VEADO

ARGENTINA POSTO



Nova poŝtmarko

La Direkcio de Pósto kaj Telegrafo el Argentino sendis al ni fotografajon de bela poŝtmarko aperonta dum monato Marto nunjara, kies kliŝon ni plezure publikigas supre. La nova poŝtmarko prezentas la belan kaj graciosan Fregaton Sarmiento, kiu de 1899 ludis la rolon de lernejsipo. Ĝin anstataŭas la krosŝipo "Argentina", kiu nun veturas al Buenos Aires. La Fregato Sarmiento faris 39 instruajn vojaĝojn, marveturante pli ol tri milionojn da mejloj tra ĉiuj maroj en la mondo.

A. C. F.

Internacia Esperanto - Ligo

KOMITATANO

S-ro d-ro Carlos Domingues. Edifício Gois.
Rua Alvaro Alvim, 27. Rio-de-Janeiro.

CEFDELEGITO

S-ro Adinar Antunes Pinheiro. Rua Dr.
Pereira Nunes, 116. Niterói. Est. do Rio.

NOVAJ DELEGITOJ

Alagoinhas (Bafa) — S-ro Carlos de Souza
Cunha. Rua 24 de Outubro, 12.

Tanabi (São Paulo) — S-ro Sebastião Al-
meida Oliveira. Rua Dr. Carlos de Cam-
pos, 508.

NOVA VICDELEGITO

Fortaleza (Ceará) — S-ro J. M. Orthon
Sidon. Rua Barão do Rio Branco, 1.330.

NOVAJ FAKDELEGITOJ

Rio-de-Janeiro — F-ino Iraní Baggi de
Araújo. Rua Julio de Castilhos, 61, casa
IV. (Bankaj aferoj).

Rio-de-Janeiro — S-ro ing. Henrique E.
Couto Fernandes. Rua Alice, 59. (Fila-
telio).

Rio-de-Janeiro — S-ro Antonio José Vaz.
Rua Paraná, 41. (Gimnastiko).

Rio-de-Janeiro — S-ro ing. Heirani Motta
Mendes. Estrada Velha da Tijuca, 542.
(industrio).

Rio-de-Janeiro — S-ro A. Caetano Couti-
nho. Rua Ana Barbosa, 48. Meyer. (Far-
macio).

Fortaleza (Ceará) — F-ino Maria Stael
Porto. Rua Benficia, 2.457. (Katolikaj
aferoj).

Fortaleza (Ceará) — S-ro d-ro Erminio
Araújo. Rua Gustavo Sampaio, 1.085.
(Latina lingvo).

Recife (Pernambuco) — S-ro Arthur Vel-
oso. Caixa postal 215. Banco aux. do
Comércio. (Bankaj aferoj).

Salvador (Bafa) — D-ro Frederico de Cas-
tro Menezes. Rua Luiz Gama, 18. (Me-
dicino).

Belo Horizonte (Minas Gerais) — S-ro Wil-
son Veado. Rua Uberlândia, 290. (flemio).

Porto Alegre (Rio Grande do Sul) — S-ro
Ary Zamora. Rua Santos Pedroso, 207
(Fervojoj aferoj).



*Vere, kune - M. Libroj,
nun jam ni havas ĉion deziratan en la hejmo*

"Literatura Mondo", Budapeŝt, IX. Soro-
ksári — Str. 81 Hungria

Membroj de I. E. L. (pagintaj ĝis 28
de Februaro).

| | 31 Dec. 1938 | 28 Feb. 1939 |
|-------|-----------------|-----------------|
| A M | 73 | 40 |
| M J | 23 | 19 |
| M A | 16 | 19 |
| M A H | 3 | 8 |
| M S | 3 | — |
| | 118 | 86 |

KORESPONDADO

S-ro PASTRO FRANCISCO BIL-
BAO — 87 Deacon Road. Bitterne.
Southampton. Anglujo—deziras ricevi
uzitajn poŝmarkojn por 150 baskaj
knaboj.

Dudeko da lernantinoj volas kores-
pondi per p. k. por perfektigo. Skribo
plej multe. Respondo akurata. Adreso:
Esperanta Kurso, Escola Normal, Ala-
goinhas-Baía-Brasil. Gratuloj al ties
direktoro, prof. A. Camargo, efikus bo-
nege.

S-ro FRANCISCO M. DA ROCHA
FILHO — 13jara, rua Cardozo Ju-
nior, 77-A, Rio-de-Janeiro, Brazilo —
deziras interŝangi ilustritajn poŝkar-
tojn.

Svedino deziras korespondi kun Bra-
zol-anoj per il. poŝkartoj. Certe res-
pondos. Adreso: F-INO MAJA EKENBERG.
Poŝtfack 48. KATTARP. — Svedlando.

FERVORAJ I. E. L. — ANOJ legas "Heroldon de Esperanto", la

SEM AJNAN

organon de Internacia Esperanto-Ligo,
kiu ĵus komencis sian 20-an eldonjaron.
Petu 3 provnumerojn kaj katalogon
kontraŭ unu respondkupono
de la eldonejo.

Heroldo de Esperanto Harstenhockweg 223

SCHEVENINGEN (Nederlando)

ESPERANTISTA BAHIANO

Aperis alia numero de "Esperantista Ba-
hiano", kies direktoro kaj eldonisto estas
la fervora kaj sindona esperantisto ing.
Jaddo Couto Maciel. Ĝi estas redaktita en
la portugala kaj esperanta lingvoj. Jen la
titoloj de ĝiaj artikoloj:

D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof. Aos Srs.
Profesores Bahianos, Sur la bordo de maro.
Ni laboru por la oficialigo de Esperanto.
Historiaj elementoj pri la komunumo de
Salvador. La Saĝulo, La barajo O' Connell.
Santo Amaro, Um compadre do imperador.
Padre Agostino Stellasi kaj Movimento
Esperantista Bahiano.

Petu senpagan ekzempleron al la Redak-
cio: Rua Luiz Gama, 18. Salvador. Bafa.

FAKAJ ASOCIOJ

Interkonsento pri kunlaboro, laŭ la
par. 13 de la Statuto, estas faritaj
kun la jenaj Fakaj Asocioj:

Denaska Esperantistaro (D. E.).

Tutmonda Esperantista Kuracista
Asocio (T. E. K. A.)

Tutmonda Asocio de Geinstruistoj
Esperantistaj (T. A. G. E.).

Bonvolu peti al nia Ligo informojn
pri tiuj Asocioj, kies kotizoj povas esti
senditaj al ili per ĝia pero.

LIVROS EM E SOBRE ESPERANTO

PODEM SER ADQUIRIDOS NA
LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA
e nas seguintes livrarias:

Francisco Alves—Rua do Ouvidor, 166
Pimenta de Mello & Cia. — Travessa do
Ouvidor, 34.

Federação Esp. Brasileira — Avenida
Passos, 30.

PEÇAM CATÁLOGO

"O Brasil Esperantista" petas
al la estraroj de l' brazilaj
klubo kaj al la brazilaj dele-
gitoj de I. E. L., ke ili sendu
monatan raporton pri siaj pro-
pagandaj kaj instruaj laboroj.

ANONCOJ

| | | |
|----------------------|----------|-----------|
| Paĝo | 100\$000 | 5 dolaroj |
| Paĝduono | 60\$000 | 3 " |
| Paĝkvarono | 40\$000 | 2 " |
| Paĝokono | 30\$000 | 1 dolaro |

Anonceto (du linioj) — 3 poŝtaje
respondkuponojn.

ANUÁRIO BRASILEIRO

DE

LITERATURA

1939

Ilustrado — 520 Páginas

contendo artigos de propaganda
do Esperanto

Preço — 15\$000

IRMÃOS PONGETTI

AV. MEM DE SA, 78. Rio-de-Janeiro